

ESPERANTO



TRIUMFONTO



Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 169
9. 12. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La II-a Kongreso de Sudslavaj Esperantistoj en Split.

La tre bone sukcesinta I-a Kongreso de Sudslavaj Esperantistoj en Zagreb decidis, ke la urbo de la II-a kongreso estos Split, la bela marhaveno kaj ĉefurbo de Dalmatio. Antaŭ al fiksi precizan daton, programon kaj aliajn aranĝojn, la subskribintoj turnas sin al la tutmonda Esperantistaro por havi taŭgajn konsilojn kaj proponojn. Nia urbo, mondkonata pro la ruinoj de la Diokletiana palaco, kiel ankaŭ nia lando pro siaj naturbelaj kaj historiaj vidindaĵoj allogos multajn en- kaj eksterlandajn samideanojn okaze de la II-a landa Esp. kongreso. Tion konsciante, ni deziras la kunlaboron de ĉiuj samideanoj senescepte kaj precipe de la najbarlandaj.

Vi devas konvinkiĝi pri la forte pulsanta Esperanta vivo sur la orienta Adriatika marbordo, kuraĝigi la apostole laborantajn tieajn pionirojn, viziti la mirindan landon de la suno kaj de la maro!

Tutmondaj samideanoj ne forgesu nin!

La kongresa komitato de la II-a S. E. K.
Prezid.: R. Rupčić, Palmina 9, Split.

Senfadena Esperanto-parolado de la Stacio de New Castle.

Okaze de la naskiĝtago de nia majstro Zamenhof, la 15-an de decembro la Esperanto Societo de New Castle o/Tyne aranĝos senfadenan paroladon pri Esperanto en angla kaj Esperanta lingvoj de la stacio de la Brita Senfadena Telefon-Kompanio en New Castle (5 NO. 400 metroj). Parolos s-o A. R. Fairbairn ĉirkaŭ la 7,15 h. p.m. (19,15 horo).

Oni petas ĉiujn samideanojn en- kaj eksterlandajn, kiuj aŭskultos la paroladon, tuj informi pri tio per poŝtkarto s-on E. Lynch-Odhams, Station Director, British Broadcasting Co., 24, Eldon Square, New Castle o/Tyne.

Esperanto Societo de New Castle
Geo Shepherd, Hon. Sekr

Kial la Deksesa ne okazos en Sofia.

Al multaj demandoj, kial la Deksesa ne okazos en Sofia, la oficiala organo de niaj bulgaraj samideanoj „Bulgara Esperantisto“ publikigas la jenan artikolon:

„La Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Societo, konante la malfacilecon de la aranĝo de Universala Kongreso, ne povis decidi facilanime inviti tian en nian landon, pro tio ĝi proponis al la X-a Bulgara Esperanto-Kongreso, kaj la kongreso ja akceptis tiun ĉi proponon, ke Bulgara Esperanto Societo invitu in XVI-an nur, se la registaro promesos doni subvencion de 100.000 lv., kiun sumon la Centra Komitato konsideris necesa por la komencaj laboroj, kaj kiun ĝi estis petinta jam de la registaro per du skribpetoj (dum marto kaj dum junio, i. k.). Ĉar la registaro ne respondis al la Centra Komitato ĝustatempe, niaj oficialaj delegitoj ricevis instrukcion de la komitato, se ili ricevos en Nürnberg telegrafan sciigon, ke la registaro donas la subvencion, en tiu okazo ili invitu la XVI-an.

Niaj delegitoj ne ricevis tian sciigon. Intertempe la bulgara ĝenerala konsulo en Dresden, kiu, laŭ la peto de Bulgara Esperanto Societo reprezentis oficiale la Ministerion de la Popola Instruado, publike deklaris, ke, se la XVI-a okazos en Sofia, li subtenos ĝin finance. La bulgaraj Esperantistoj, ĉeestintaj la XVI-an, konsiderante, ke la plej grava demando, kiu hezitis Centran Komitaton de Bulgara Esperanto Societo inviti

la kongreson, nome la demando pri monrimedoj, estas solvita, insistis, ke la oficialaj delegitoj de Bulgara Esperanto-Societo invitu la XVI-an al Sofia; ili faris la inviton kaj la kongreso akceptis ĝin. Tiu akcepto, kiel ni jam diris supre, havas valoron de deziresprimo, kaj post tio restis tasko de la Centra Komitato de Konstanta Komitato, kolektante informojn pri la objektivaj cirkonstancoj, fari la definitivajn decidojn.

La Centra Komitato de Konstanta Komitato rilatis al la Centra Komitato de Bulgara Esperanto Societo. La lasta komitato ekagis pli energie kaj ricevis la sankcion de la registaro, kiu promesis ankaŭ monhelpon. — Tamen la interna politika stato, kiu okupis tre multe la registaron, malhelpis al ĝi preni tiun decidon ĝustatempe kaj respondi tuj al Bulgara Esperanto Societo, pro kiu ankaŭ Bulgara Esperanto Societo devis doni al Centra Komitato de Konstanta Repraentantaro malfrue sian respondon. Dume la Centra Komitato de Konstanta Repraentantaro devis jam decidi; el Bulgario ĝi ne havis ankoraŭ definitivajn oficialajn respondojn; la francaj kaj belgaj Esperantistoj esprimis al ĝi deziron, ke la kongreso okazu en Vieno, ĉar Sofia ŝajnas al ili tro malproksima kaj ili ne povus partopreni la XVI-an; la Wien'aj samideanoj deziris scii, ĉu la kongreso okazos en ilia urbo aŭ ne, ĉar la tempo fluis kaj la eventualaj preparaj laboroj por la kongreso devis komenciĝi. En la sama tempo en Bulgario okazis bedaŭrindaj politikaj tumultoj, kaj tio certe devis mediti la eksterlandajn samideanojn, ĉu ne estas riske decidi kunvoki kongreson en landon, en kiu la interna situacio estas neklara.

En ĉi tiuj cirkonstancoj la Centra Komitato de Konstanta Repraentantaro prenis sian decidon, kaj ĝi povis esti nur favora al la Wien'a invito. Ĉiu trovos tiun decidon plej racia.

Konsiderante, ke la motivoj, pro kiuj Wien estas preferita en tiu okazo, estas seriozaj, kaj ke ĉiu agas sammaniere, kiel la membroj de la Centra Komitato kaj Konstanta Repraentantaro, la Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Societo akceptis senproteste tiun definitivajn decidojn. Tiel devos ĝin akcepti ankaŭ la tuta bulgara Esperantistaro, kaj, kiel ni jam alvokis ĝin, ĝi devos daŭrigi energie kaj senhalte sian pacan bataladon, por prepari certan grundon por invito de unu estonta universala Esperantista kongreso en la bulgaran landon.“

Fonografo kaj Esperanto.

En la numero de 14. oktobro 1923 mi legis interesan artikolon pri tiu ĉi temo. Certe estas prava sinjoro Wood parolante pri la graveco por Esperanto por ĉiam konservi la elparolon de Esperanto per individuoj, apartenantaj al iu aŭ alia lingvoj. Multe da Esperantistoj havas helme tian aparaton, idon de la modernaj tempoj, kiu ĝuigas sian posedanton kaj... enuigas ties najbaron. Kaj estas evidente ke unu el la plej konsiderindaj kvalitoj de l' fonografo, kaj eble la plej kurioza, estas konservi la voĉon de personoj kiuj jam ne ekzistas en la mondo. Aŭdi la parolon de estiimita persono, kiu apartenas jam al regno de mortintoj, estas kvazaŭ supernatura faro, kiu per si mem montras, ke la estimo, kiun donas al fonografo la granda amaso da personoj, estas pravigita.

Kion ne scias s-o Wood, kaj mi dankas la okazon por sciigi al li kaj al la Esperantistaro ion novan rilate la aferon, estas, ke la voĉo de nia majstro D-ro Zamenhof kaj de multaj pioniroj de la nunaj tempoj jam, ho ve! forlasintaj tiun ĉi mondon, kiel ekzemple Bourlet, Grabowski, Pollen kaj aliaj, kaj krom tiuj de multaj dank' al Dio vivantaj, estas konservita en granda kolekto de s-o Sabadell (Lingvokomitarano kaj malnova Esperantisto) en Barcelono, kiu dum la okaziĝo de la V-a Kongreso en nia urbo havis la feliĉan ideon gravuri sur la vaksan cilindron de sia fonografo

la voĉon de dek-duo de la plej eminentaj Esperantistoj ĉeestantaj la kongreson. Dank' al tiu feliĉa cirkonstanco la Esperantistaro havis en sia mano la eblon farigi diskutojn kaj ĝeneralligi la aŭdadon de la elparolo de Zamenhof, Bourlet, Ménil, Sebert, Grabowski, Puulá, Pollen ktp.

Nur unu cirkonstanco mi volas citi ĉiuj eble estos malfacile venki. La voĉoj estas gravuritaj sur cilindro de antikva aparato. La diskoj de modernaj gramofonoj ne estis antaŭ 15 jaroj tre ĝeneraligitaj, eble estis ankoraŭ eltrovitaj. Do, la problemo estas, ĉu la moderna gramofona industrio povas transporti al nunaj diskoj kaj gravuri sur ili voĉon prenitajn ne de homo, sed de alia aparato?

Se tio estas solvita, mi estas certa, ke nia samideano s-o Sabadell transdonos aŭ vendos aŭ lasus al serioza firmao la rajton fari kopiojn de lia kolekto: kaj tiam la Esperantistoj de la tuta mondo povus aŭdi la voĉon de l' Majstro hejme. Se tio ne estas ebla, nur la Barcelonaj samideanoj daŭros ĝui tiun okazon en la hejmo de nia ĝentila samideano.

M. Jobé, Barcelona.

Ni petas la afablan sendinton de la artikolo anonci al ni sian adreson, kiu mankis sur la manuskripto same kiel sur la koverto ĝin enhavinta. Red.

Vojaĝante kun Esperanto.

La tagon, kiam mi decidis lerni Esperanton, mi ĉiam benos. Kiel agrable estus por la vojaĝantoj, por la turismo, se ĉiu konus nian lingvon!

La 16-an de julio mi forlasis Batavia per la vaporŝipo „Insulinde“ de Rotterdam'a Lloyd, kaj post feliĉa kaj agrabla marvojaĝo mi alvenis en Port Said. Al la tiea delegito mi skribis amiaŭ mia eliro el Nederlanda Hindujo, ke komence de aŭgusto mi alvenos en Port Said.

Kiel granda estis mia ĝojo, kiam nia samideano Cather venis sur la ŝipo je mia alveno. Kvankam mi parolis ĝis tiam kun tre malmultaj Esperantistoj, ni bone komprenis unu la alian. Ĉe la lando sur la ŝipo li rakontis al mi i. a., ke intertempe la tiama delegito translokiĝis al Alexandria kaj ke la delegito transsendis mian leteron al li, s-o Cather, kiu antaŭ unu laro venis al Port Said. Post la lando mi kaj mia familio albridiĝis sub lia gvidado.

Nia samideano kondukis nin ĉien kaj montris al ni la vidindaĵojn de la urbo, rakontis al ni ĉiujn specialaĵojn, gvidis nin al la plej bonaj kaj fidindaj butikoj, — unuvorte, ni havis lin kiel konfidindan kaj agrablan gvidanton. Pro lia gvidado ni ne estis devigitaj trakti kun diversnacaj gvidistoj, kiuj penus nin erarigi kaj montrumpi, kiuj kondukis nin al butikoj de suspekta speco, kun kiuj ili konspiras, de kiuj ili ricevas parton de la profitaĉo. Mia edzino estis plena de entuziasmo, ĉar neniam ĉe niaj vizitoj al Port Said, en tiu bruema nefidinda urbo, ni ĉirkaŭpromenis kaj ĉirkaŭveturis je tia kvietaj sento kaj aĉetis tiel malkare, sen la sento esti trompataj, ĉion kion ni bezonis.

Nia afabla samideano avertis nin pri ĉio en nia kara lingvo. Je la kvina posttagmeze li kondukis nin al la ŝipo, kaj ni kore adiaŭis, kvazaŭ ni konus unu la alian jam de jaroj.

Tie ĉi mi dankas s-on Cather pro lia afableco, bonvolo kaj sindono kaj esperas, ke UEA nomos lin delegito en Port Said por la intereso de la samideanoj, kiuj vizitos tiun urbon.

Post ses tagoj ni venis al Marseille. Kiel al Port Said, mi skribis antaŭ mia foriro el Javo ankaŭ al la delegito en Marseille, ke meze de aŭgusto mi alvenos tie. Ni alvenis la 10-an.

Ĉe la alveno en la haveno mi atendis Esperantiston sur la ŝipo, sed bedaŭrinde neniu alestis. Ni albridiĝis esperante renkonti la delegiton sur la bordo, opiniante ke estis eble malpermesite al li veni sur la ŝipon, kvankam multaj fremdaj personoj venis sur ĝin. Ankaŭ vane!

El la hotelo mi skribis al s-o R. Beck, delegito en Marseille, leteron kaj komisiojn ĝin al portisto

de la hotelo. Tiu ĉi revenis kun la letero kaj informo, ke la sinjoro elurbigis. Felice longan tempon mi korespondis kun s-o Vaysse tie, al kiu mi nun skribis, ke mi venis al Marseille. La portisto returnis kun la informo, ke tiu sinjoro tuj venos.

Post unu horo s-o Vaysse estis en mia hotelo. Li diris, ke hodiaŭ bedaŭre li ne povas proponi sian servon, ĉar li devas labori en sia oficejo, sed ke la morgaŭan tagon li volas sin liberigi por gvidi nin. Nature mi akceptis la afablan proponon.

La postan tagon je la naŭa li venis denove en mian hotelon. Li montris al ni (mi kaj mia familio) ĉiun vidindaĵojn de la urbo. Ankaŭ tie ĉi mi devas komunki, ke ni perfekte komprenis unu la alian, kaj en lia elparolo de Esperanto kiel franco, same kiel en tiu de s-o Cather kiel irlandano, mi ne rimarkis dialekton. Ambaŭ parolis Esperanton pure. Tio estas pruvo, ke nia lingvo estas vere internacia.

La tutan tagon ni ĉirkaŭvagadis kaj tramveturis kaj vespere returnis tre lacaj al nia hotelo. Ni dankis s-on Vaysse pro lia afableco kaj lia agrabla gvidado, kaj ĉar ni vidis sufiĉe de Marseille, ni decidis la sekvontan tagon forveturi al Genève.

Ĉar nia unua plano estis, vojaĝi de Marseille al Paris kaj ne al Svislando, por resti tie kelkajn tagojn, mi ne skribis al la delegito en Genève. Malsaĝe de mi estis, ke mi ne kunportis ĉe mi la jarlibron de UEA, tiel ke mi ne sciis la nomon de la tiea delegito.

En Genève ni restis du tagojn. Poste ni veturis per radŝipo al Lausanne. Belega urbo sur deklivo de monto, vastiĝanta apud la Lago Lemano, kun bonega klimato! La meza temperaturo estas 51° F. Ni trovis tie la okcidentan kaj la orientan plantkreskadon unu apud la alia. Belaj bedoj de floroj okcidentaj, meze de kiuj staras palmoj orientaj!

Ĉar Lausanne estas konstruita terase sur montodeklivo, la vojoj kondukas supren-malsupren, tra kiuj la tramoj veturas je rapideco, kvazaŭ ili estus ebenaj. Ĝi estas urbo de intelekto. Oni trovas tie diversajn lernejojn, kaj la lerneja kotizo estas tre malalta, eĉ de la Universitato, kiu havas certan famon kaj estas vizitata de studentoj el ĉiuj regionoj de la mondo. La vivkondiĉoj ne estas karaj.

Foje mi staris sur platformo de tramvagono, havante mian insignon, la verdan stelon, sur la kolumo de mia frako. La kondukisto alparolis min Esperante. Mallonga interparolado komencis inter ni, kaj ĉi rakontis al mi, ke en Lausanne estas Esperanto-klubo, kaj li nomis al mi s-on Warner kiel prezidanton. Kvankam dum mia tuta vojaĝo mi portis la insignon, tio estis la unua fojo, ke oni alparolis min Esperante. La nombro da Esperantistoj ankoraŭ ne estas tre granda, sed certe estas, ke en ĉiu urbo loĝas Esperantistoj, kiuj tamen ne ĉiam membris al UEA.

Post restado de ok tagoj ni forveturis tra Dijon al Paris, kie ni alvenis vespere. La sekvontan tagon mi veturis al la domo de s-o Delanoue, delegito en Paris, sed bedaŭrinde li ne estis hejme. Li foriris al la kamparo por libertempo, kaj ĉar mi ne havis la jarlibron, mi ne sciis alian adreson. Oni rimarkas, kiel necese estas, ke vojaĝante oni havu ĉe si la jarlibron de UEA.

En Paris ni restis tri tagojn por aĉeti la necesajn vestojn kaj por viziti la plej signifajn vid-

indaĵojn, ĉar ni intencis poste reviziti tiun ĉi urbegojn.

La 22-an de aŭgusto ni forlasis Paris por finnian vojaĝon al Nederlando.

P. W. van den Broek,
Leiden (antaŭ: Grisee, Javo).

Kroniko.

Por aeri nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informo, ni bezonas scilgajn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administral aŭ privataj scilgaj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (preclpe nomoj)

Landoj.

Anglujo.

Newcastle. La Zamenhofa Festo de la Nord-Orienta Federacio okazos lundon, la 17. dec. je la 7.30 h. p.m., ĉe la Y.M.C.A., Blackett Street.

La ĉiujara Afero Kunveno de la Nord-Orienta Federacio okazos sabaton, 19. jan., ĉe la Temperance Institute, Westgate Road, Newcastle. La Afero Kunveno komencos je la 2.30 h. p.m. Teomango (1 ŝ. 3 d.) je 4.45 h. Vespre festelo. Vizitantoj estos tre kore bonvenantaj.

Bulgarujo.

Tirnovo. La 14. nov. malfermiĝis kurso, kiu partoprenas 50 geurbanoj. La intereso pri Esperanto en Tirnovo estas granda, pro tio dum monato julio okazis tie ĉi la X-a Bulgara Esperanto Kongreso. La grupo „Lumo“ estas unu el la plej malnovaj grupoj en Bulgarujo. G.D.

Francujo.

Paris. La 29. nov. okazis la disdono de premioj al la lernantoj de kursoj de la Esp. Federacio de Parisa Regiono, sub la prez. de s-o André Baudet, membro de la Parisa Komerca Ĉambro. La unuan premion ricevis s-o Goutenville de Towry. La soleno sekvis koncerta parton.

La Lernejo de Alta Komerca Instruado por fraŭlinoj en Paris, privata lernejo, aprobita de la ŝtato kaj direktata de f-ino Sanua, Komitatino de „Esp. kaj Komerco“, post provo de nedeviga instruado de Esp. enkondukis ĝin devige kaj havas kurson kun 90 lernantinoj.

Nia s-ano Collin, Profesoro de la Parisa Universitato, eksrez. de la Franca Scienca Asocio, estis elektita membro de Franca Scienca Akademio.

La Parisa Universitato donis la titolon de D-ro honoris causa al eminenta amiko de Esp s-o Torres y Quevedo, Prof. de Sciencoj, konata mekanikisto.

Germanujo.

Festvespero de la Esperanto Gruparo Berlin okaze de la 20 jara datreveno de la fondiĝo.

En la plej maloportuna tempo, en kiu en Germanujo la intereso pri idealaj aferoj estas repusata, nun estas la 20 jara datreveno de la fondiĝo de la Esperanto gruparo Berlin. Oni ne povis aranĝi brillan jubilean vesperon, sed nur modestan sed indan memorfesteton kaj samtempe propagandvesperon. Ĝi okazigis la 17-an de novembro 1923 en la salonego de la Werner-Siemens-Realgymnasium Berlin-Schöneberg. Ĉeestis ĉ. 150 personoj, inter ili ankaŭ multaj malnovaj Esperantistoj, krom ŝia reprezentanto de la Ministerio de la internaj aferoj, reg. kons. Dr. Becker, anstataŭinta ŝtatan sekretarion Schulz, kaj diversaj reprezentantoj de berlinaj gazetoj kaj unuigoj. La prezidanto Direktoro Glück salutis la ĉeestantojn kaj transdonis la bondezirojn de Esperantistoj el plej diversaj landoj. Pluraj el ili per dankindaj subvencioj ebligis la festaranĝon.

Fino Nickel faris mallongan paroladon pri la temo: 20 jaroj de Esperanto en Berlin skizante en ĝi la kreskadon de la grupo sub la regado de la diversaj prezidantoj: Prof. Schmidt Patentadvokato Schiff kaj Direktoro Glück. — Poste Dr. Winsch en bonega propagand-parolado interese pritraktis Esperanton kaj la unuan tempon de la vidpunkto de reformisto.

S-oj Kirschke kaj Blankenheim bonege deklamis Esperantan tradukojn kaj originalaĵojn, inter ili de Baghy.

La plej interesa parto de la vespero estis la mallongaj raporto de la ĉeestantaj fondintoj kaj longjaraj kunlaborantoj de la grupo Berlin. Profesoro Schmidt, Potsdam, bedaŭrinde ne povis ĉeesti, sed Direktoro Glück laŭlegis lian salutleteron, kiu estas grava konfeso de sciencisto por Esperanto. — S-o Jules Borel, frato de la fondinto, en brila kaj ŝerca maniero parolis pri la tempo antaŭ 20 jaroj kaj nun. S-o sekreta konsilisto Wetekamp donis

aĵojn (t. e. la gazetaj sciigoj) de ĉiuj eŭropaj kaj de kelkaj amerikaj radiostacioj. Kune kun la eltrovo de potencaj fontigiloj (katedralaj lampoj) oni sukcesis konstrui tiom malgrandan akceptan aparaton, t. e. ilaro, per kies helpo oni akceptas la venantajn elektran ondon kaj plue transformas ĝin en la aŭdeblajn per la orelo streketojn kaj punktojn kaj kies kombino estas la alfabeto de Morse, ke ĝi ne nur havas sufiĉe da loko sur la skribotablo, sed ankaŭ — kiel tiam faras la anglaj kaj amerikaj amatoj — estas tiel oportuna ke oni prenas ĝin kun si dum la promenadoj (pieda, bicikla ktp.). Laŭ la amerikaj sciigoj de majo de la pasinta jaro, la divastiĝo de la radioteknikaj aparatoj, desinitaj por la vasta amaso (amatoroj), ricevis tian karakteron, ke dum printempo 1922 la amerikaj firmaoj konfirme al la bezono devis liveri al la vendado unu milionon da tiaj amatoraj radiostacioj.

La limoj de tiu ĉi artikolo ne permesas detale priskribi la signifon de tiu granda utilo al la ŝtato, permeso de la amatoraj ricevaj radiostacioj kaj ankaŭ de certa en difinitaj limoj „libereco de la etero“, ratio de radiokomunikigo ktp. Sufiĉos montri, ke en Nord-Ameriko dum 3 jaroj fondiĝis pli ol kvincent radioklubo kaj radiosocietaj unuigantaj jam pli ol 4000000 da radio amatoj, posedantaj 2½ milionojn da ricevantaj kaj dekmilojn da sendantaj radiostacioj, sekve de tia disvastiĝo la militista informservo de la Nord-Amerika armeo ne bezonas klopojn pri la instruado al rekrutoj de la rezervantoj por la radioteknikaj taĉmentoj kaj en neceseza bezono, oni povas uzi por la militaj celoj la aparatojn de la radioamatoroj. Ankaŭ la radioteknika industrio de Ameriko kaŭze de la grandega produktado kaj disvastiĝo de malgrandaj radiostacioj disvolvigis tiel, ke la trusto de amerikaj naciaj firmaoj submetas ĉiam novajn kaj novajn regionojn. Ĝi tiel forprenas al la tri aliaj tutmondaj potencaj trustoj germana, anglaj kaj franca la konstruadon kaj koncesion por radio eĉ en tiel „malproksimaj“ landoj kiel Polujo (aŭtuno 1921). Kaj kiom ĝi helpas la ĝenerale-teknan kulturan evoluon de la lando inter ĝiaj va-taj amasoj, kiom ĝi helpas la tutmondan radioprogreson per popularigado de radiotelefono — oni vidas eĉ el la fakto, ke de la 17. ĝis 27. decembro 1921 en Ameriko okazis konkurso de radiotelefono trans la Atlantikan oceanon (al Anglujo). En ĝi partoprenis pli ol 35000 da amatoraj radiostacioj. Dum la unua konkurso oni ne sukcesis transsendi la parolon, sed en la dua (post 2 monatoj) jam 17 amatoj

klarigojn pri Esperanto de la vidpunkto de lernejestro. Krome parolis patentadvokato Schiff kaj s-o Markau.

Post la 10 h. ĉeestis ferma la oficiala parto kaj membroj kaj gastoj ĉeestis en senĝena kunveno en apuda kafejo, ĝis noktomezo

Hildegard Nickel.

Jugoslavio.

Dubrovnik. La ĵus fondita Esperanta Klubo elektis ienan estraron: prez. s-o D-ro Fr. Velnić, sekr. s-o M. Monić, kas. s-o J. Većman, revizoroj s-oj Baburica kaj Jazbec. La 4. nov. okazis la unua amuzovespero kun bela programo en la katolika societo „Bošović“. Ĉeestis pli ol 200 personoj.

Novaj kursoj por lernantoj de mezaj lernejoj kaj por laboristoj.

Korĉula. Dank' al la klopodoj de s-o P. Droiš, impostestro, malfermiĝis kurso kun 31 partoprenantoj. En aliaj lokoj de la insulo kreas la intereso.

Janiina. Kun novaj fortoj kaj freŝa entuziasmo komenciĝis la unua Esp. vivo. La jam ekzistanta Esp. Klubo reorganizigis kaj multaj novaj adeptoj estas varbitaj per senlaca klubo prezidanto s-o Ba-elli kaj sekretario s-o Marinović. Novaj kursoj malfermiĝis kun pli ol 30 partoprenantoj.

Mali Prolog. La fondita Esp. grupo nombras ĉirkaŭ 20 membrojn malfermiĝis la unua kurso.

Split. Oni fervore laboras ĉi tie por la II-a sudslova Esp. Kongreso. Finiĝis la 5 semajna kurso en la gimnazio kaj komencis nova kurso por laboristoj en unu el la popolaj lernejoj. Fondiĝis Esp. Centra Informejo por Dalmatio.

Litovio.

Kaunas. La 18. nov. en la granda salono de Litova Universitato s-o P. M-dem. Laris propagandan paroladon pri Esp. Ĉeestis multaj gestudentoj kaj unu profesoro. — Kurso en la humanitara fakultato.

Malta insulo.

Tie ankoraŭ propagandas krom kelkaj aliaj samideanoj malnova pioniro de nia afero D-ro G. Busutil, membro de L.K

Nederlando.

Utrecht. Dimanĉon, la 18. nov. la „Utrecht Esp. Rondo“ festis sian 20-jaran jubileon. Oni aranĝis ekspozicion de Esperanto-verkoj kaj gazetoj en hotelo „L'Europé“. Vespre okazis en la granda salono de la sama hotelo la rememor-festo Alvenis gratuloj de eminentaj Esperantistoj en la lando kaj la feston partoprenis krom multaj Utrechtanoj, samideanoj el Amsterdamo, Amersfoort, Arnhem, Den Haag, Antwerpen ktp. I. a. ĉeestis unu el la fondintoj de la grupo, la eminenta s-o D-ro Baart de la Faille. S-o v. Allefen, unu el la unuaj membroj malfermis la kunvenon per festparolado, en kiu li rememorigis pri la pionira laboron kaj sinofera propagando de la unuaj nederlandaj Esperantistoj, kiel ekz. s-o Drevs Uitterdijk, Baart de la Faille, Romein k. a., el kio rezultiis la fondiĝo de la unua loka Esp. klubo en Nederlando, nome tiu de Utrecht kaj de la nederlanda Esp. societo „L. E. E. N.“

Estis ludataj du teatraĵoj, la unua „Neniam estas pli bone ol malfrue“ (ŝanĝita nederlanda proverbo „Malfrue estas pli bone ol neniam“) de la Utrechtanoj; la dua „Nantia“, humoraĵo de la vizitantoj el Amsterdam sub laŭdira gvido de s-o Dufreme.

Poste paroladis bone konata kaj elokventa ĉefrabeno Tal. La feston agrabligras bela kantado de eminenta kantiistaro, fortepiana kaj violona ludo kaj posta balo.

O. J. Degenkamp.

Polujo.

Białystok. S-o Pasynkowski, forveturinta ĵus Amerikon, varbis la lokan direktoron de la „Cunard-Line“, s-o Kuszer, fervore lernanta Esperanton.

Bydgoszcz. Loka semajna gazeto „Volkszeitung“ regule ĉiunumere aperigas dank' al la fervoro de ĝia ĉefred. parlamenta deputito Pankratiz vastan Esp. angulon Ĝi estas eble unusola tiurilite el ĉiuj nacilingvaj gazetoj de Polujo kaj tial ĝia subieno de ĉiuj germanlingvaj anoj en Polujo estas rekomendinda. Ĉe Pola Esp. Servo en Bydgoszcz. Duga l., stariĝis speciala gaezservo. Oni sendu al ĝi adreojn de gazeted., dezirantaj Esp. angulojn ktp. Pro la graveco de la nacilingva gazetaro por nia afero, oni atentigas pri supra aranĝo ĉiujn s-anojn en Polujo.

Łódź. Plej bone organiziĝis kaj propagandas ĉi tie la laborista societo Esp. „Laboro“, str. Zamenhofa 17, fliao de ĝia centro en Warszawa.

Lublin. En la „Vesperaj Klerigaj Kursoj por Maturuloj“ en la Vira Instruista Seminario estas Esp. instruata kiel nedevigaj lernobjekto. La orelegojn de s-o Cz. Pruski, del. de UEA, vizitas 36 kursanoj.

atingis la celon de la konkurso. La grandegaj sukcesoj de la aviada tekniko kaj de ingeniara arto kreis novan fakon — la aviadan radioteknikon. La utiligo de radiotelefono sur la aeraj ŝipoj prezentis multajn allogajn perspektivojn. Sufiĉis montri, ke ankoraŭ en la fino de la jaro 1918 la nordamerika armeo havis tutajn arojn (ĝis 40 aeroplanoj entute) da aerŝipoj, direktitaj dum la flugo per la voĉo de la ŝipara estr. sur la tero.

Dum la provo de unua tia aerŝiparo, en junio 1918, ĉiuj 39 aeroplanoj de la aera taĉmento, harmonie, plenumadis en aero diversajn novajn, komplikajn turnadon, glitadon por la flugmaŝino fluebadon „korktirilan“ kaj aliajn laŭ ordono de sur tero. Kaj ĉiu eliris el tiu ĉi provo tute sendifekte, nur ĉe unu estis difekta la anteno. Tiel estas nomata longa je cent meiroj bronza drato, servanta por forsendado kaj akceptado de elektromagnetaj ondoj pere de kiu oni laboras en la aero lana radiotekniko. Ĝi dum la tuta tempo direktiĝas malsupren. En Anglujo jam estas prilaborita la projekto ebligi al ĉiu abonanto de la ordinara surtera telefona stacio komunikiĝi radiotelefone kun alia persono, troviĝanta sur la aerŝipo, fluganta, ekzemple, super la Atlantika oceano dum la flugo Paris—London. En la pagon por la flugo estas kalkulita ankaŭ la prezo de unu radiointerparolo de la aeronlana pasaĝero kun la abonanto de unu el tiuj ĉi stacioj. Jam dum la unuaj flugoj trans la oceanon la aerŝipoj kaj aeroplanoj estis ligitaj pere de radio kun ambaŭ kontinentoj kaj kun la vaporŝipoj sur la oceano. Kaj tiu ĉi komunikigo ne nur sufiĉis por la bezonoj de la aeropla-pasaĝeroj: la ŝipkapitano ricevas de la specialaj surteraj radiostacioj meteorologiajn sciigojn gravajn por la aviadistoj. Tiel, ekzemple, la aerŝipo „R 34“ evitis, dank' al la ricevitaj sciigoj per la radiotelefono la ciklonon dum la vojaĝo de Anglujo al Ameriko. Dum la revolaĝo, dank' al la samspecaj sciigoj, li trafis favoran musonon, kaj tial la vojaĝo de Ameriko al Anglujo estis plenumita dum 55 horoj anstataŭ 94, uzitaj dum la unua vojaĝo. Tio okazis ankoraŭ en la jaro 1919. Estas memkompreneble, ke radioaparatoj, tiel flindaj trovis por si ĉiulokan disvastiĝon en la aviado. Ne estas eble tie ĉi pli longe paroli pri tio. Ni montru nur, ke en la katalogo de unu germana firmao, aperinta en la komenco de 1919 estas nomataj pli ol 25 tipoj de tiaj radiotelefonaj aerŝipaj stacioj. (Dadrigo sekvas.)

Progresoj de la radiotekniko.

De Ing. V. J. Bajenov.

El rusa lingvo tradukita de A. Hajkis.

I.
La radiotekniko, en ĝia nuntempa evoluo, jam delonge eliris el la komenca fazo — el la nura radiotelegrafado, t. e. sendrata interspaca transigo de Morse'aj alfabetaj signoj (punktoj kaj streketoj), kiun eltrovis en la jaro 1895 la italo Marconi kaj la rusa prof. A. S. Popov. En la nuna tempo oni donas ĉiam pli kaj pli da atento al la radiotelefono (t. e. sendrata interspaca transdono de homa parolo, kanto, muziko ktp.). Ĝi sukcese ligiĝas kun la perdrata telefono, trovas novajn faktojn por utiligo, eliras el la sfero estrata de lokaj specialistoj, kaj laŭ la amerikaj sciigoj jam fariĝis atingebla al ĉiu ajn amatoro. Fine, la telemekaniko — sendrata interspaca transigo de energio — prezentas la regionon de estonto. La malgrandaj sukcesoj, atingitaj en tiu ĉi fako, ankoraŭ ne eliris el la fazo de laboratoriaj esploroj, kaj tial pri la praktikaj rezultatoj en tiu ĉi rilato oni ankoraŭ ne povas paroli certe. Aparte de la ĉi supre nomitaj tri artoj de utiligo staras la radiodirekto, permesanta difini la direkton kaj lokon de la radiostacioj kaj permesanta orienti sin sen kompasoj en la aero kaj sur la maro.

La radiotelegrafado en sia interspaca agado atingis jam sur tero sian liman grandecon — tiaj potencaj stacioj kiel Long—Island (Ameriko), Nauen (Germanujo), Bordeaux, Saint-Assise (Francujo) kaj kelkaj aliaj jam atingis certan radioligigon kun la antipodoj t. e. la ricevantaj aparatoj, troviĝantaj sur la kontraŭa punkto de la tera supraĵo, ricevantaj la signalojn de tiaj stacioj.

Eksterlande la tre rapidan kreskon de la radiotekniko multege helpis la eterna instigilo de la progreso — la bezono, kiu eksterordinare kreas koncerne la radioinstrumentojn kune kun la registara solvo (en la lastaj 1½—2 jaroj) de la demando pri la privataj (amatoraj) radiostacioj en multaj landoj (Ameriko, Nederlando, Anglujo ktp.). Dank' al la speciala eco de radiotransdono — la signaloj disvastiĝas laŭ ĉiuj direktoj —, ĉiu amatoro, konstruinta al si la ricevantan radiostacion, povas, sciante la aŭdan akceptadon, ricevi laŭdezure la radiokorespond-

Por la fak-rubrikoj
de nia gazeto
ni bezonas
daŭre ĉian aktualan
materialon!
Sendu ĝin tuj
al la redakcio
ESPERANTO TRIUMFANTA
Horrem b. Köln, Germanujo.

Warszawa La ĝisnuna prez. de „Pola Esp. Societo“, s-o D-ro Jerzy Leth kaj sekr. s-o Stankiewicz, rezignis je siaj postenoj. Novelektita en ĝen. elekta kunsido estas: prez. s-o Stan Karolczyk, red. de „Pola Esperantisto“, sekr. s-o inĝ Tyminski. *Pola Esp. Servo.*

Rumanujo.

Arad. S-ino Margareto Roth gvidas kurson por komencantoj (60 personoj) kaj kurson perfektigan en la laborista hejmo.

Bucuresti. La 4 nov. en la ŝtata liceo „Spiru Haret“ antaŭ pli ol 300 personoj s-oj Henriko Fischer L. K., direktanto de Esp. Centro Rum. D-ro F. Iosif, vicprezidanto de Rum. Esp. Societo, kaj A. Ce, ĉefdel. de UEA, faris efikan propagandparoladon, kies rezulto estis la malfermo de jenaj kursoj: En la liceo „Spiru Haret“ publi. kursoj kun 90 kursanoj. En la ŝtata liceo „Matei Basarab“ publi. kurso kun 50 lernantoj. En parko „Carol“ en la pavilono de Societo „Gib“ publi. kurso kun 65 lernantoj. Ĉar la kursanoj konsistas krom rumanoj antaŭ el germanoj, hungaroj kaj rusoj, la kursoj estas farataj nur en Esperanto, laŭ rekta, konversacia metodo. La kursojn, kiuj daŭras ses semajnojn kun 12 lecionoj, gvidas s-oj pastro A. Ce kaj Tiberio Morariu.

Crailova. S-anoj P. M. Popescu kaj Johano Kiss preparas kurson.

Giurgiu (danuba havenurbo ĉe la bulgara limo). La 11 nov. vizitis la urbon s-oj D-ro F. Iosif, vicprezidanto de Rum. Esp. Societo, kaj Tiberio Morariu, sekret. de Esp. Centro Rum. el Bucuresti. por prepari kurson publikan. Priiraktadoj kun s-oj Ionescu, direktoro de l' komerca lernejo, kaj F. Chiriac, direkt. ro de liceo „Matioreanu“, kondukis al bonaj rezultoj, laŭ kiuj oni baldaŭ malfermos kursojn.

Gradiŝte (apud Bucuresti). Je la fervoraj klorodoj de s-o prof. Meitert estas aranĝataj kursoj en la Norma Lernejo (preparo de instruistoj). Enskribiĝis ĉ. 200 personoj.

Odorhei (Szekelyudvarhely, Transilvanio). S-o Julio Szabo, del. de UEA, malfermis kurson la 5. nov.

Oradea-Mare. F-ino Lili Jakner gvidas du kursojn ripvetajn.

Gazetaro.

- Narod, Split 1. 11.—27. 11. Kun regula informrubiko pri Esperanto.
- Dubrovnik, Dubrovnik, 19. 10. Esp. kaj L. d. N. (laŭ ET).
- Zürcher Post, Zürich, 23. 10. Pri la kunv. de la svisa societo. — 20. 10. Esp. kaj transportlaboristoj (laŭ ET).
- New Jersey Post, Town of Union, 13. 10. Noto pri Esp. Unguns Dzeŝejas, Riga okt. Noto pri Esp.
- Westmanlands Allehanda Västerås 13. 10. Esp. kaj L. d. N.
- Freiheit, Wien 16. 9., 14. 10., 21. 10. Notoj pri Esp.
- Der Eisenbahner, Wien 15. 10. Detala artikolo pri Esp.
- Lublinter Tagblatt, (jida) 30. 10. Esp. kaj L. d. N. (laŭ ET).
- Republika, Lodz. 17. 10. Pri Lyonsa Komercio (laŭ IK).
- 5. 11. Pri bulg. Rozoleo (laŭ IK). — 24. 10. Pri laborist. bankoj (laŭ IK)
- Reichenberger Zeitung, 15. 11. La dua ĉeĥoslovaka Esp.-kongreso 1924 en Reichenberg
- Reichenberger Zeitung, 15. 11. Du notoj pri Esp. — 27. 10. Esp. en hig. ekspoz. Strasbourg.
- Sozialdemokrat, Prag, 15. 10. Esp. por la poŝtservo.
- Reichenberger Zeitung, 18. 11. Esp. lingvo por la radio-sfero.
- Gewerkschaft der Postler, Reichenberg, nov. Esp. en la poŝtservo. Granda artikolo.
- Vorarlberger Wacht 17. nov. Artikolo pri lernado de Esperanto por socialistoj.
- L'Indépendant, Perpignan 30. 10. Esp. kaj komercio. La artikolo aperis en aliaj 8 gazetoj de Perpignan kaj N-rbonne.
- Le Radical, de Marseille, 25. 10. Pri Esp.
- Moniteur du Puy-de-Dôme, Clermont-Ferrand, 26. X. Longa art. pri Esp. en la Societo de Nacioj.
- Journal de Bruges Bruges-Belgulo, 21. X. Represo de favora artikolo de s-o Baudet, membro de la Parisa Komercia ĉambro.
- Eugenia, okt. Detala Esp. fakto Zamenhof kaj la Esperantismo.
- Gazeta de Vich (kataluna) 6. 11. Div. notoj pri Esp.
- Il Corriere di Sicilia, Catania 30. 10. Esp. kaj L. d. N.
- L'Unità Cattolica, Firenze 19. 10., 23. 10., 26. 10., 6. 11. Polemiko kontraŭ Esp. kun trafa respondo.
- La Nazione, Firenze, 2. 11. Pri Esp.
- Rezen en Treken, Arnhem 20. 11. Esp. kaj L. d. N.
- Her Vaderland, s'Hage, 4. 11. Anonco pri kurso.
- De Zuidwillemsvaart, okt. 5 div. tradukoj el ET.
- Nieuwsblad van Deurne, 6. 10. Pri Esp.
- Päewaleht, Tallinn, 27. 10. Plur inform. pri Esp. — 11. 11. pri Esp. — 21. 11. pri Esp.
- Cuântul, Braila, 2. 11. Esp. en komerc-lernejoj de Italujo (laŭ ET).
- Gazet van Mecheln, 16. 11. Esp. kaj pezo. — 24. 11. Esp. kaj policoj (laŭ ET).
- De Volksgezond. Antwerpen. Pri la radioparol. Merchant. Vovruil, Antwerpen, 8. kaj 9. 10. Novaj aervejlinioj en Rusio. (laŭ ET).
- Gazette van Gent, Gent, 8 kaj 9. 10. Novaĵoj el Rusujo k. c. (laŭ ET).
- Scănteia Ploesti, Rumanio, 8. 11. 1923. Art. pri Esp. ĉe la Ligo de Nacioj.
- Adeverul Literar Bucuresti 11. 11. 1923. Recenzo ĝen. pri la Esp. literaturo kaj tradukita novelo el Literatura Mondo, de s-o G. Bugariu.

- Oktobra raporto de la gazetservo de Hung. Esp. Instituto.
- Pénztézetl Tisztviselők Lapja, sept. Pri Esp. kurso alvoko.
- Pécsi Lapok, 23. sept. Post kvinjaro sciigo pri mortinto per Esp.
- Vasvármegye, Szombathely, 23. kaj 30. sept. pri Esp. Societo kaj prelegado. — 26. sept. pri prelegado de D-ro Takács.
- Hir, Szombathely, 23. sept. Pri konkurso por kongresglumarko. — 26. sept. Pri neokazo de Kölna Foiro laŭ ET!
- Délmagyarország, Kaposvár, 30. sept. Artikolo pri Pariza provo por traduko de Esp. kaj diversaj lingvoj. — 4. okt. Internacia Religia Kongreso laŭ ET. — 5. okt. Sciigo pri artikolo de „Internacia Komercio“ pri Hungara Ekonomio. — 9. okt. Esperanto ĉe Ligo de Nacioj (laŭ UEA). — 14. okt. Pri libro de D-ro Toschi „La Grande Carpatia“. — 28. okt. Budapeŝta granda Esp. kunsido. — 31. okt. Venonta Esp. kongreso en Vieno.
- Ul Somogy, Kaposvár, 4. okt. Internacia religia kongreso (laŭ ET).
- Könyvkiadó Lapja, Budapest, 5. okt. Artikolo pri Esp.
- Délmagyarország, Kaposvár, 18. okt. Esp. instruado en italaj komerc-lernejoj (laŭ ET) — 24. okt. Laŭ Informilo: Svedaj-Rusaj komercaj priiraktadoj. — 26. okt. Pri Esp. kurso. Laŭ Informilo: Deketaĝa hotelo en Praha.
- Miskolczi Napló, Miskolc, 30. okt. Pri la Viena pol'cikongreso kaj Esp.
- Somogyi újság, Kaposvár, 18. okt. Kursoj Esp. — 17. okt. La Nova Eŭropo (laŭ ET).
- Dunántul, Pécs. La Nova Eŭropo (laŭ ET)
- Pesti Hírlap, Budapest, 20. okt. Esp. en italaj komerc-lernejoj (laŭ ET).
- Magyarság, Budapest, 18. okt. La Grande Carpatia, libro de D-ro Toschi. — 21. okt. Esp. parolado en protest. societo. Esp. kongreso en Vieno.
- Világ Nemzeti Újság, Budapest, 28. okt. Esp. grandkunsido en Budapeŝt.
- Pester Lloyd, Budapest, 28. okt. Esp. grandkunsido en Budapest. — 25., 26., 31. Esp. grandkunsido kaj laŭlegadoj en Budapeŝt.
- Világ, Budapest, 27., 29. Esp. grandkunsido kaj laŭlegadoj en Budapeŝt.
- A Nép, Budapest, 24. okt. Debreczena grupo fondiĝis.
- Világ, Budapest, 5. okt. Pri Internacia Laboroscio Esp. sciigo — 21. okt. Esp. prelegado en protest. societo.
- A Hir, Szombathely, 14. okt. Franca gazeto faras provon por Esp. irad. — 20., 23. Esp. en komerc. nova societo de Szilcs. — 2. okt. Prop. parolado de D-ro Takács.
- Vasvármegye, Szombathely, 8., 21., 19. okt. Esp. prelegadoj, Szilcs, Takács. *P. Balkanyi.*

Scienco.

La nunjaraj Nobel-premiitoj.

La Sveda Akademio aljuĝis 3 el siaj premioj al la sekvantaj eminentuloj: al la irlanda poeto William Butler Yeats por literaturo, al la Profesoro Fritz Pregl de Graz (Aŭstrio) por kemio, al profesoro Robert a. Millikan de la Universitato de Pasadena en Kalifornio (Usono) por fiziko. Niajn legantojn sendube interesos biografiaj detaloj pri la premiitoj.

La irlanda poeto Yeats estas filo de la konata irlanda portretpentristo Yeats kaj naskiĝis la 13. junio 1865 en Sandymount apud Dublin. Li devis fariĝi pentristo. Sed oni atribuas al la influo de Oskar Wilde, ke li dediĉis sian povon al la literaturo. Li loĝiĝis al London, kie aperis lia unua volumo de versaĵoj „The wanderings of Oisín“, kiu vivigis la kritikon pro ĝia originaleco kaj romantikeco. 1892 sekvis plua volumo, enhavante inter alie „The Countess Kathleen“. 1894 oni ludis lian dramon „The Land of Heart's Desire“ en la Avenue-Teatro en London. Poste li interesigis la publikon ankoraŭ per granda aro da publikigaĵoj. Li fondiis kaj redaktis la revuon „Beltain“, kiu poste estas alinomita „Tainhain“. En ĝi li disvolvis sian idealajn projektojn pri kreo de irlanda teatro literaturo. Oni konsideras lin ĉefo de la movado de kelta renesanco.

Profesoro Pregl de post multaj jaroj estras la katedron por kemio en la medicina fakultato de la universitato de Graz. Kiel lernanto de Emich li okupis sin, simile al la sveda kemiisto Profesoro Bank, pri mikrokemiaj metodoj. Li faris analizo eksperimentojn per trege malgrandaj kvantoj — multe malpli ol miligramo — laŭ plej severaj kondiĉoj de la scienco. La mikro-analizon, kiun Emich kaj antaŭe lia samlandano Donau estis alaborinta por la organa kemio, Pregl aplikis al la ne-organika kemio. Li montris, ke oni ne plu bezonus fari la elementan analizon per minimumaj kvantoj da 0,1 gr. Sufiĉas laŭ lia metodo kelkaj miligramoj, eĉ unu miligramo kaj malpli. Tio evidente kaŭzas vicon da avantaĝoj: konsiderinda ŝparo je tempo kaj gaso, plue malpli grandigeblo de la aparatoj kip. Dum kelka tempo Profesoro Pregl ankaŭ laboris sub Emil Fischer kaj kune kun Abderhalden. Vastaj rondoj konas Pregl pro ektrovo de Jod-solvaĵo, kiun oni konsideras kiel trege gravan eltrovon en la sfero de eksperimenta terapeŭtiko. Oni uzas ĝin por kontraŭbatali la artriton kaj krome kiel desinfektilon dum diversaj kirurgiaj operacioj.

Profesoro D-ro Millikan naskiĝis 1868 en Morison en la ŝtato Illinois. Li estas plej parte instruata en Germanujo. Dum la naŭa jardeko de l' pasinta jarcento li laboris sub Nernst en la fizika-kemia sfero. Post kiam li revenis al Usono, li fariĝis fizik-profesoro je la universitato de Chicago (1910—1920), poste oni konfidis al li la gvidadon de la nova instituto por teknikologio en Pasadena. Dank' al lia gvidado tiu ĉi instituto estas unu el la plej riĉe ekipataj institutoj fizikaj de l' mondo. La famon de Millikan kaŭzis antaŭ ĉio liaj eksperimentaj esploroj pri la unueca ŝarĝaĵo elektra. Sed ne sole la elektra scienco profitis de la esploroj de Millikan, sed ankaŭ la optiko. Li ekzemple faris gravajn konstatojn pri la karaktero de mallongondaj radioj.

Astronomio.
Nova kometo.

Astronomo Dubnjago de la observatorio unisersitata en Kazanj, eltrovis kometon de oka grandeco en la konstelacio de Ŝipo Argo, je sud-oriento de la Sirlus. Ĝi rapide foriras al la suda duonglobo. *P. Poniŝevskij, Kiev.*

Internacia trafiko.
Aerveturado.

Estonia alteca rekordo.

Dum provflugo de la hejmkonstruita aeroplano, okazinta antaŭ nelonge, estas starigita nova alteca rekordo por Estonio — 4300 m. La malvarmo supre estis ĉ. 20° R. *R. L.*

Vogllanda Esperanto-Gruparo.

Zamenhof-Festeno kaj Laborkunsido, Dimanĉon, la 16. 12. 1923 en Plauen.

La 16. decembro estas elektita kiel „Vogllanda Esperanto-Tago“ en Plauen. Antaŭagmeze je 1/2 11 h. solena „Zamenhof-Festeno“ en la Esperanto-Hejmo, Gottschaldstr. 25 III (angulo Karlstr.), je 1/2 2 h. komuna vizito de la Vogllanda Muzeo en Königstr. Precize je la 3-a h. posttagmeze — ree en la „Esperanto Hejmo“ — laborkunsido de la Vogllanda Esperanto-Gruparo.

Gesamideanoj, venu multnombre! Vi estas ĉiuj kore invitataj!

Kun Esperanto saluto altestime.

Germana Esperanto-Asocio.
Loka Grupo Plauen.

Alvoko!

La kompleta ekonomia katastrofo en la okupata germana teritorio kaŭzis, ke du triono de la loĝantaro fariĝis senlaboraj. La mizero de la milita kaj postmilita tempo pliigas per la akompanaĵoj de senlaboreco: En nehejtataj ĉambroj frostas kaj malsatas nenombrebla aro da pej bedaŭrindaj infanoj, kiuj certe nepre ne komprenas pro kio estas ĉio ĉi tio. La morto minace laŭdisfrapas al la pordo de ilia hejmaĉo. Kun lasta fortolo malmulti, kiuj ankoraŭ kapablas helpi, provas forpeli la senduldeman. Al la helpantoj apartenas nelaste ni — Esperantistoj.

La Neŭtrala Esperantist-ro 1906 Köln, Hohestr. 26, insiste ripetas sian porristinaskan alvokon en ET n-o 166. Ĝis nun alvenis kesto kun kondensita lakto kaj 30 ĉ. kr. de s-o K. el Dolni Kounice!! Al la donacintoj kaj donacintoj nian plej koran dankon!

Brakel, prezidanto.

Junker, del. de UEA.

Dankesprimio.

La loka grupo Köschau (Germanujo) ricevis de f-ino Helmi Linnell, Tampere, Finlando 80 frank. kaj de f-ino Junita Franz, Udine, Italio 5 italiajn lirejn kiel helpon por ĝia 1-a fondiĝo festo kaj propagando-vespero kun ekspozicio kaj parolado, pri kio estas dankeme kvitancate tie ĉi.

Koncerta Kantaro.

Simplej kantoj kun facila akompano de fortepiano.

Eldonita de P. C. Brederode kaj K. Veldkamp; tradukinto de la tekstoj Jan Ziermans.

1-a parto.

holandaj guldenoj: broŝurita 2.50, bindita 3.50. svisaj franko: broŝurita 5.—, bindita 7.—.

Eldonejo:

P. Noordhoff, Groningen,
Holando.

FILATELISTOJ!

Bonvolu skribi al ni pri vial specialaj deziroj. Ni sendos kolektojn de poŝtmarkoj je pli malalta prezo por laŭp-ĉa elekto. Kondiĉo: garantilo per referencoj pretere flanko de delegitoj de UEA aŭ de Esperanto-organizaĵo aŭ kontraŭ depono de malgranda sumo en nacla mono de via lando ĉe ni aŭ iu banko.

Faru provon, kin kostas al vi nenion!

Utiligu Esperanton por pligrandigi vian kolekton. Por kelkaj naciaj monbiletoj vi ricevos profitdolan sendaĵon por elekto. Tion, kio ne plaĉas al vi, vi raitas resendi.

Korespondas Esperante, germane, angle, france!

M. Fischer & Co., Fach 7
Münsterberg (Silezio, Germ.)

Lege registrita, membro de la Unuiĝo de la Silliaj Poŝtmarkvendistoj, Breslau.
Entrepreno de UEA kaj membro de kelkaj Esperanto-Unuiĝoj.

Al la hodiaŭa numero estas aldonita la decembra „Revuo“.

Alvoko.

La Esperanta Unuiĝo de l' Ruĝa Kruco alvokas ne nur la Esperantajn membrojn de la Unuiĝo, sed ankaŭ ĉiujn Esperantistojn, ke ili apogu la Ruĝan Krucon en la paca laboro por la tuta homaro. Tiu ĉi cele la subskribinta Konstante Komitato urĝe serĉas en ĉiuj landoj delegitojn kaj aligantojn, kiuj plifaciligas la laboron de la organizado kaj ne donos kotizon, sed sian propran laboron.

La aliĝojn sciigu al adreso de prezidanto aŭ de la sekretariino.
La Konstanta Komitato de la Esperanto Unuiĝo de l' Ruĝa Kruco.
Alison A. Nicol, Sekretariino, D-ro Géza Halmágyi,
268 Kenmore Street, prezidanto Paragván u. 18
Pollokshields Glasgow Szombathely
Skotlando. Hungarujo.

ZAMENHOFA TAGO POR ZAMENHOFA MONUMENTO.

Se 5000 Esperantistoj donacos ĉiu po unu ŝillingo, aŭ 10000 po ses pencoj, ni havos la plenan bezonatan sumon por la monumento.

Ĉu tio estas tro granda postulo??

Organizu ĉie specialan monokolekton en la Zamenhofa tago. Postulu la kupon-kartojn por vendi kaj sendu la monon al la Honora Kasisto W. M. Page, 31, Queen Street, Edinburgo, burĝo, Skotlando.

En la nomo de la Org. Kom.

J. D. Applebaum, Hon. Sek.

11, Mayville Road, Mossley Hill, Liverpool, Anglujo.

Jus aperis:

AKBAR

Orienta romano de P. A. S. van Limburg Brouwer, tradukita de J. C. kaj J. R. G. Isbrücker kaj J. Ziermans, rekomendata de Esperantista Literatura Asocio.



Prezo por bonvalutaj landoj 1,80 hol. guld. + afranko. Mendebila ĉe

J. R. G. Isbrücker, v. Beverningkstraat 10,

's-Gravenhage, Nederlando.

Fundamenta prezo por malbonvalutaj landoj 3,60 or.-mk. Mendebila ĉe

Ellersiek & Borel G. m. b. H. Wilms-Strasse 5,

Berlin SW 61, Germanujo.

Eugen Wüster.

Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana.

La unua parto ĵus aperis (Literoj A-Ĉ)

Prezo: 14 — gmk (× ŝlosilnombro) = avis. fk. 17 50; hol. guld. 8.—; ŝil. 14/—; kĉ. 105.— ktp

ANTAŬMENDOJ

de la dua kaj tria partoj nur povas esti akceptataj, se ili estas akompanataj de 3 \$ aŭ samvaloro en alia nacia monunuo.

La a tegaj preskostoj kaŭzitaĵ de a ma-bonega ekonomia stato de Germanando devigas nin je nulgo de niaj antaŭe sciligitaĵ lverkondiĉoj ri'ate a pagon de 1 aŭ 2 \$.

La presado nur povas esti daŭrigata, se a venos amenaŭ 500 antaŭmendoj.

Mendu senprokraste, se vi deziras la daŭrigon de tiu plej grava el ĉiuj vortaroj!

Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

Kristnasko alproksimigas!!

Donacu bonajn Esperantajn librojn!

Wisemann, Fabiola	5.—
Sedel, Vintro Fabeloj	1.50
Hebbel, Gyges kaj lia ringo	2.—
Ramo, En Svistando	2.50
Goethe, Hermano kaj Doroteo	1.20
Thurston, La urbo de b-lega sensencaĵo	2.—
Bulthuis, M-l iĉa en spirit	1.—
Bulthuis, Taglibro de Vilaĝpedelo	0.75
Oberrotman-Jung, La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof	1.20
Rleck, Oni Ridis	1.—
BES-a Adresaro (por kolektantoj)	1.—

Ni liveras nur post antaŭa pago. Por afranko aldonu 10%. Por germanoj la prezoj estas fundamentalaj prezoj multobligitaj per la valida ŝlosilnombro.

Butin & Jung, G. m. b. H.

Esperanto-Eldonejo, Godesberg (Germani.), Bahnhofstr. 30. Poŝtĉeka Konto Köln 92036.

Meyer's Handlexikon

oka eldono, komplete re prilaborita kaj plimultigita.

75000 gvidvortoj kaj referencoj kun 2000 ilustraĵoj sur 1632 pg. da teksto, 7 koloritaj, 46 nigraj tabeloj kaj tabel-listoj, 8 koloritaj kaj 37 nigraj landkartoĵ, 24 resumoj tekstaj kaj statistikaj.

Unu volumo tole bind. mk. 15.— × ŝlosilnombro; eksterlande sv. fk. 15.—; duontede bind. mk. 18.— × ŝlosilnombro. Eldonejo de Bibliographisches Institut, Leipzig.

Komentario al Fausto

verkita de Max Butin, L. K. Prezo: 30 sv. centimoj aŭ 30 gmk. × ŝlosilnombro.

Eldonita kaj havebla ĉe Butin & Jung G. m. b. H., Godesberg (Germanlando) Bahnhofstr. 30. Poŝtĉeka Konto: Köln 92036.

Anoncetoj

PROFESORA KURSO EN MISKOLCZ, HUNGARUJO. La 5 novembro komenciĝis kurso por geprofesoroj sub gvidado de prof. König Lajos. Ĉi tiu estas la unua okazo, ke geprofesoroj amase lernas nian lingvon en Hungarujo. Partoprenas la kurson pli ol 20 geprofesoroj de 8 mezgradaj lernejoj. Ĉar ili tre ŝatus post kelkaj semajnoj interrilatiĝi kun ĉiulandaj gekolegoj, ni petas ĉiujn geprofesorojn kaj geinstruistojn ĉiufakajn, ke ili skribu kiel eble grandnombro al la kursgvidanto. Adreso: Kolozsvari strato 8, Miskolcz, Hungarujo. Ĉi skribonto ricevos respondon. [1]

KURACISTO, hebrea, mezaĝa, serĉas postenon, laŭeble hospitalan, eksterlande. Proponojn peras H. Wittenberger, Del. de UEA, Anina/Banat, Rumanujo. [2]

KANADO. Mi deziras korespondi kun kanadaj Esperantistoj. J. B. E. de Koster, 98, Daltonstraat, den Haag, Holando. [2]

MI TRANSLOKIĜIS denove al Nederlando kaj devas peti miajn multnombrajn korespondantojn pri ioma pacienca. Pro komprenebla troa okupo mi povos nur post ne longe respondi al ĉiuj korespondantoj. Pastro R. W. F. Kyŝtenbelt, Amsterdam, antaŭe Del. UEA en Menado, Celebes, Nederl. Hind. [2]

KIU SAMIDEANO PRUNTEDONUS al germana samideano 15-20 dolarojn aŭ egalvaloron por elmigri. Repago okazos post aŭ intertempe de duona jaro, plus 200%. Proponojn bonvolu sendi al: S-o Walter Strenger, Zuffenhausen-Stuttgart, Königstr. 22, Württemberg (Germanlando). [1]

EDZIĜOPETO. Gesamideanoj diskonigu tion! Franco, fraŭlo 36-jara, havanta bonan metion kaj monon por fondi komercon, deziras kore-pondi kun fraŭlino aŭ vidvino, prefere hebrea el Orienta Eŭropo. Propono tre serioza. Ne timu skribi Skribu Esperante aŭ france al s-o Geblanc, 101, avenue de Californie, Nice, Francujo. [1]

KIU SCIAS IOM PRI ADRESO aŭ sorto de rusa Esperantisto Tiliĉeev Georgij Dmitrijeviĉ, bonvolu skribi al la frato M. D. Tiliĉeev, Moskva, Ostojenka, 2 j Iljinskij, 15, kv. n. 1, Rusujo. Al personoj, sciigontaj ion pri Georgo Tiliĉeev, ĉiuj elspozoj estas rekompendotaj laŭdeziro, ĉu monie, ĉu per libroj, poŝtmarkoj ktp. [1]

GEFARMACISTOJ (gedzoj) serĉas eksterlande, laŭeble transmare, postenon. H. Wittenberger, Anina/Banat, Rumanujo. [2]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Jules De Sloover, instruisto-studento, Ledeganckstraat 8, Gent, Belgujo, deziras korespondi per il. pk. kaj interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. [2]

S-o Jos. De Graeve, Staatsnormal-school 8, Gent, Belgujo, deziras interŝanĝi il. pk. kaj papermonon kun la tuta mondo. [2]

S-o Heinrich Schwarz, komercisto, Trautenau, Ĉeĥoslovakio, petas japanajn samideanojn por alsendo de diversaj malgrandaj manlaboraĵoj, bildoj ktp. precipe el Japanujo, rekompendotaj. [2]

S-o Otto Krickau, fraŭlo, Kirchstr. 16, Magdeburg, Germ., deziras korespondi kun Svedujo, Norvegujo, Finnlando, Rusujo per il. pk. kaj l. Interŝanĝas papermonon. [2]

Fervoral gepropanoj serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj. Korespondas per il. pk. kaj l., petas ankaŭ Esperantojn. Skribu al: S-o D. B. Albanov, Arkadak, Saratovsk gub., Ruslando. [2]

Sendu monon, egalvaloro de hfl. 0.10 kaj vi ricevos paketon da belaj poŝtkartoj il. de Holando. Adreso: 98 Daltonstraat, den Haag, Holando. [2]

S-o Lukacs, Cluj, Rumanujo, Victoriei 89, sendas rumanajn poŝtmarkojn kontraŭ alilandaj. [2]

S-o Emérico Boskovitz, profesoro, Cluj, Rumanujo, Calea Regele Ferdinand 21, interŝanĝas poŝtmarkojn k. ĉ. l. [2]

Kun junaj knabinoj de la tuta mondo korespondadus volonte per il. pk. fraŭlo Wilhelm Kugler, strada Castelului 2, Braşov, Rumanujo. [2]

F-ino Miŝi Beer, strada Castelului 136, Braşov, Rumanujo, deziras korespondi per il. pk. k. ĉ. l. [2]

Junuloj. La jenaj kursanoj deziras tutmondajn korespondantojn: Sidney Brown, (16 jara fraŭlo), Hilda Ormanroyd, (13 jara knabino), Norman Fortune, (10 jara knabo), Winifred Fortune, (12 jara knabino), Leslie Fortune, (12 jara knabino), James Mackbinder, (16 jara fraŭlo), Edith Isherwood, (20 jara fraŭlino), Clara Robinson, (21 jara fraŭlino). Adresu leterojn aŭ pk. al 17, Chesham Street, Bradford, Anglujo. [2]

F-ino Margaret Newboul (ĵurnalistino) 17, Chesham Street, Bradford, Anglujo, deziras korespondadi precipe kun rusoj, ĉinoj, japanoj, italoj, kun ĵurnalistoj tutmondaj, kaj kun ĉiuj kursestroj pri metodoj lernigi Esperanton. Interŝanĝas Esperantajn librojn por infanoj. [2]

S-o I. Szalay, Gézor utca 9, Kaposvár, Hungarujo, deziras interŝanĝi pm. k. ĉ. l. [2]

S-o Petr A. Petrov (22-jara), en Tirnovo, ul. „Asenova“, Bulgario, deziras korespondi kun tutmondanoj per il. pk. kaj l. Certe respondas. [2]

Dezirantaj kolekti pm. speciale por propagando de Esperanto: samideano Sziec, Delegito de UEA, str. Warszawska 12, Radom, kaj samideano W. Kijak, poŝtisto, Radom, Polujo. [3]

Filatelistoj! Interŝanĝas ĉiujlandajn pm. (prefere ekster-eŭropo) aŭ papermonon kontraŭ danzigaj kaj germanaj pm., kor. per pk. il. bfl. Respondas tut. Oskar Köhler, Oelsnitz i. Vogtl Bergstr. 3 (Germanujo). [2]

Seriozulo deziras korespondi kun samcelanoj pri spiritismo kaj la pli alta penso. Orientuloj kaj azianoj preferataj. Mi ne respondas al filatelistoj. R. Carman, 62, Malvern Road, Dalston, London E. 8, Anglujo. [1]

S-o Petr Colov, Vidin (Bulgar.) 22-jara, deziras korespondi kun gesamideanoj per l. kaj il. pk. [1]

S-o M. Dembinski, Lodz, Zachodnia 66, Polujo deziras korespondi kun progresintaj (lingve) geesperantistoj ĉiulandaj per il. pk. kaj l. [1]

Interŝanĝas pm. k. ĉ. l. laŭ Michel 1923. Donas: rusajn, ukrainajn, danzigajn, palestinajn kaj malofitajn polejn. Ne sendas unue. Ne pre respondas. Samuel Gelrud, Hoszcza pow. Rowne (Polujo). [1]

S-o C. M. Stevens, Schiesstraat 43, den Haag (Nederland) deziras korespondadi kaj interŝanĝi kun gesamideanoj el la tuta mondo per il. pk. ktp. [1]

S-o Maurice Baeyens, instruista studento, ŝtata instruista lernejo, Ledeganckstraat 8, Gent (Belgujo) korespondas kun la tuta mondo per pk., pm. kaj l. [1]

S-o Michel Bevernaege, 28 Grand' Place, presisto, Audenaerde (Belgujo) deziras korespondi per pk. kaj pm. [1]

S-o Viktoro De Merlier, instruista studento, Ledeganckstraat 8, Gent (Belgujo) deziras korespondi kun la tuta mondo per pk. kaj pm. [1]

S-o L. Supovar, Moskva, Rusujo, Stoleschnikov per 7 kv. 9, korespondas kun gesamideanoj tutmondaj, interesiĝas pri arto, lastaj atingoj de scienco-tekniko-hemio kaj pri laboristaj organizaĵoj. Kolektas poŝtmarkojn, interŝanĝas rusajn pm. Korespondas per il. pk. kaj l. [1]

Fraŭlo 18 jara, A. Abramov, Rusujo, Moskva gub., urbo Serpuhof, Vokzalnaia 29, deziras korespondi kun seriozaj amatoj de fotografado, prefere kun ne-komencantoj kaj samaguloj. [1]

Filatelistoj! Por 2 avis fk. aŭ egala valoro mi sendas 50 div. malofitajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig. Interŝanĝas pm. Oskar Köhler, Oipnitz i. Vogtl., Bergstr. 3. [1]



Unika! Senkonkurenca! Novaĵo!

Originala Arto de la „Nigra Arbaro“. Ni fabrikas en propra fabrikejo praktikajn malgrandajn galanteriaĵojn el ligno, plastike artiste pentritaĵoj, Malgrandajn kaj pli grandajn kasetojn, ornamajostaketojn, tabak- cigaro kaj cigared-kestetojn, mur-bildojn, alumet- kaj cindruojn, kandelinojn, ovo-pokalojn, murkalenduar-doraĉin figurojn por diversa uzado, buŝtutringojn, botelkorkojn ktp.

Grandiozaĵ, tamen malmultekostaĵ artikloj.

Eksperto al ĉiuj landoj. Jen praktika laborkampo kaj bona okazo montri al la komercistaro la taŭgecon de Esperanto. Subtenu niajn klandolojn, aĉetu mem, peradu negocojn aŭ instigu ĉiujlandajn armaĵojn interrilati kun ni.

Fervoral reprezentantoj en ĉiuj landoj serĉataj. Skribu ĉiuj al la

Komercista Esperanto Grupo Freiburg i. Br. (Germanujo), Katharinenstrasse 14

asociita kun unueklasaj fabrikestoj Entrepreno de UEA.